**N I A  V O Æ O**

**Madrida Esperanto-Liceo**

San Alejandro 6-4ºB-Ext. 28005 Madrid

(Nur poþta adreso)

Ni kunvenas lunde je la 18,30 en Rodríguez San Pedro 13-3º-7

Redaktas kaj eraras: Lupe Sanz **MAJO 2004**

## PREMIO ADA SIKORSKA

La Estraro de Madrida Esperanto Liceo aprobis unanime, en sia kunveno de la 12a de aprilo, proponi al AUGUSTO CASQUERO DE LA CRUZ kiel kandidato al Premio Ada Sikorska.

Unue por liaj personaj rilatoj kun Ada Sikorska. Li, kiel Prezidanto de Madrida Esperanto-Liceo, akceptis la geedzojn Fighiera kiam ili venis al Madrido kaj laboris kune kun ili pri la vigligo de la madrida e-movado, kies pinto ili estis dum tiuj æi jaroj.

Due kaj æefe pro la daýra laboro por Esperanto kiun li faris kaj plu faras en HISPANIO:

Amaso da hispanaj esperantistoj (æefe madridaj kaj valenciaj) konas la lingvon pere de la instruado de Augusto en kulturaj centroj, lokaj grupoj, universitatoj, lingvaj lernejoj, ktp.

Li havas la hispanan rekordon pri la organizado de E-kongresoj (unu universala, du naciaj kaj kelkaj regionaj kaj turismaj renkontiøoj)

Dum la jaroj kiam li loøis en Madrido, li organizis multajn ekster-esperantajn aktiva¼ojn (tendumadon, ekskursojn, vojaøojn, ktp.) kiuj kaptis amason da esperantaj simpatiantoj kaj gelernantoj por la kursoj de MEL.

Trie, por lia laboro EKSTERLANDE: instruisto en Esperanto pri la hispanaj lingvoj kaj kulturo, profesoro de la Internacia Universitato de San Marino, organizanto de vojaøoj en Esperanto tra Hispanio, kiel delegito de Monda Turismo, kaj organizanto de karavanoj al UK-oj por hispanoj.

Madrida Esperanto Liceo petas al æiuj e-grupoj kiuj deziras apogi la kandidatecon de A. Casquero ke ili sendu leteron al du jenaj adresoj:

Komisiono pri la Premio Ada Sikorska. Prezidanto: G.C. Fighiera.
Via Sandre 15, 10078 Venaria Reale (To) , ITALIO
Fax + (39) 011 226 30 78
Komitatano: Luis Serrano luis_serrano@mixmail.com

## FUNDACIÓN ESPERANTO

Laý la programo de Fundación Esperanto kaj la anonima donaco de ekzempleroj de "Gran Diccionario Español-Esperanto" por Publikaj Bibliotekoj de provincoj sen esperanta movado, en aprilo, Rafaela Urueña prelegis hispanlingve pri "Esperanto, de sus orígenes al siglo XXI", en Burgos. Poste oni donis al la direktorino de la Urba Biblioteko ekzempleron de GV kaj aliajn librojn en Esperanto.

## BIOGRAFIO DE ZAMENHOF

Pedro Garrote daýrigas la tradukon al la hispana de la verko de Centassi y Masson "La homo kiu defiis Babelon". MEL kontaktis kun la eldonejo "Gram Ediciones", kies eldona fonda¼o temas pri lingvoj, kaj øi estas preta por eldoni kaj distribui la hispanan version.

La Valencia-Murcia E-kongreso, laý la normala ordo, æi jare devas okazi en la provinco Valencia. La valenciaj esperantistoj akceptis la inviton de Cheste okazigi la kongreson en tiu vilaøo, simbola por nia movado. http://www.infonegocio.com/augustocasquero/cheste.htm

La dato estos 29-30 de majo (sabato-dimanæo).

## HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

La Sekretario, Manolo Parra, de¼oras lunde kaj jaûde vespere (18,30-21,00h); dum aliaj tagoj vi povas faksi aû telefoni al 91 446 80 79 aû kontakti rete admin@esperanto-es.net

**EXPOLINGUA.** Kiel veterana partoprenanto HEF montris en sia malgranda budo la lastajn nova¼ojn pri Esperanto, inter kiuj trovi is la Granda Vortaro Hispana-Esperanta. Pedro Hernández kaj Tonyo del Barrio aktive partoprenis en la foira programo.

## PRI "Don Ki¶oto" KAJ CERVANTES

Legado de kelkaj paragrafoj de "La inøenia hidalgo Don Ki¶oto de la Manæo", en Esperanto, okazis en la "Círculo de Bellas Artes" la 22an de aprilo, jaýde. La senpaga ¼urnalo "20 minutos" anoncis la eventon kaj speciale menciis la legadon en Esperanto.
La teksto de "El Quijote" tradukita de F. De Diego, ne estas la unua verko pri la senmorta libro de Cervantes. Je la komenco de la antaýa jarcento, Mangada jam tradukis kaj eldonis kelkajn æapitrojn, aparte de kelkajn "Novelas ejemplares" de Cervantes.
MEL antaý kelkaj jaroj donacis ekzemplerojn de "El Quijote" en Esperanto al "Museo del Quijote" de El Toboso (Ciudad Real) kaj al la "Sociedad Cervantina" kies sidejo estas en la loko kie estis la presejo kiu eldonis unuafoje la senmortan verkon. (Strato Atocha de Madrido)

## NOVA LIBRO DUM HEF-KONGRESO

Post "Gran Diccionario Español-Esperanto", la eldonejo de M. G. Adúriz eldonos "ESPERANTO: LENGUA Y CULTURA", hispanlingve verkita de Antonio Valén. Æi tiu 200-paøa verko estos prezentata al la publiko la 28an de aýgusto en Bilbao, kadre de la 63a Hispana Kongreso kaj de la 6a Kongreso de Eýropa Esperanto-Unio.

Madrida Esperanto-Liceo, por profiti antaý-eldonan rabaton por grupoj (8 eýroj; inkludas sendokoston), faros komunan mendon. Antaý-pago necesa al la
konto de Madrida Esperanto-Liceo *
æe Banco Altántico 0008/0110/97/1120/404200
Vi devas preni vian ekzempleron æe HEF, en Rodríguez San Pedro 13.

Se vi mendos persone, nur unu ekzempleron, vi ricevos øin hejme kontraý nur 10 eýroj! kaj vi NE devos pagi sendokostojn. Sed se vi prenos mem vian ekzempleron en la kongreso de Bilbao, vi pagos nur 8 eýrojn!. Pagu REKTE en oficejo de BBVA*, kontonunero: 0182-3834-30-0200964425, je nomo de Miguel Gutiérrez, (pago per æeko ne akcepteblas). Poste sendu kopion de via pago al: MGA, Los Coteros 1 C, 2 Iz; 39600 Muriedas; Cantabria. aý nur informu al <liven@wanadoo.es>.
* Lasta tago por akcepto de antaýmendo estas la 30a de junio.

## VENONTAJ PROGRAMOJ EN MADRIDO

Niaj konversacia-rondoj okazas æiulunde, ekde la 18.30 h, en RODRÍGUEZ SAN PEDRO 13-3º-7 Tel. 91 446 80 79.

8-an de majo, sabato, ekskurso per trajno (8,30h ekde Chamartin) al Medina del Campo por viziti la ekzposicion pri "Isabel I de Castilla". Renkontiøo kun esperantistoj de Valladolido.

17-an de majo. Projekcio de lumbildoj "Æu vi vere_konas Madridon? . Lupe Sanz

---

**ESPERANTO LICEO DE MADRID**
Asociación de Utilidad Pública Municipal
San Alejandro 6- 4ºB EXT
28005 Madrid